Sennacieca Asocio Tutmonda en Hispanio

INFORMILO

Numero 6/eo
Septembro 2005

# KONKLUDOJ DE LA SAT-KONGRESO

## DEKLARACIO

La 78-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Zagrebo de la 2-a ĝis la 9-a de julio 2005:

- **Kondamnas** ĉiujn atencojn kiel tiujn, ĵus okazintajn en Londono kaj ĉiujn militojn.
- **Postulas** dialogon kaj intertraktadon kiel rimedon al solvo de konfliktoj kaj aplikadon de la Ĝeneva konvencio al ĉiuj kaptitoj, interalie de Guantanamo-Golfo.
- **Ree postulas** ke la landoj, kiuj ne ankoraŭ subskribis la Konvencion de Otavo, pri la "malpermeso de la uzado, produktado kaj stokado de kontraŭpersonaj minoj kaj pri la detruo de kontraŭpersonaj minoj", nepre subskribu kaj apliku ĝin.
- **Postulas** inkluzivi en la kampon de apliko de la Konvencio de Otavo ĉiujn armilojn kiuj eksplodas, samkiel kontraŭpersonaj minoj, t.e. pro la ĉeesto, proksimeco aŭ kontakto de eĉ nur unu homo.
- **Postulas** mondan solvon de la problemo pri rifuĝintoj kaj malaperigon de provizoraj restadejoj por ili.
- **Alvokas** la loĝantaron de ĉiuj landoj ne subskribintaj la Kiotan konvencion pri mediprotektado, premi sian registaron tuj subskribi ĝin.
- **Apogas** la mondajn, kontinentajn kaj lokajn sociajn forumojn kiuj kontraŭstaras la liberalan kapitalisman tutmondiĝon.
- **Kontraŭstaras** sklavecon kaj uzadon de virinoj kaj infanoj kiel varojn.
- **Defendas** la homajn rajtojn por ĉiuj homoj, inkluzive de malliberigitaj esperantistoj.

## GVIDREZOLUCIO

La 78-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunveninta en Zagrebo:

- **Instigas** siajn membrojn agadi en siaj medioj por disvastigi la ideojn de SAT kaj varbi novajn membrojn.
- **Petas** ĉiun anon starigi kaj partopreni debatojn kaj diskutojn en la kongresoj, Sennaciulo, retdiskutejoj, ktp.
- **Instigas** la membrojn aĉet(ig)i kaj legi la eldonaĵojn de SAT cele akiri rimedojn por plu eldoni.
- **Alvokas** ĉiujn anojn aktivi por la laikeco en sia respektiva lando.
- **Instigas** siajn membrojn partopreni en la diversaj sociaj forumoj.
- **Forte apogas** iniciatojn de SAT-membroj en diversaj kampoj korespondantaj al la celoj de la Asocio por ke poste ili iĝu iniciatoj de la tuta Asocio.
- La Kongreso de SAT **renovigas** sian fidon al k-do Kreŝimir Barkoviĉ en la funkcioj de sekretario kaj redaktoro.

# PORPACA AGADO

## DATREVENO DE LA UNUAJ ATOMBOMBOJ

Dum tiu ĉi monato aŭgusto okazis la 60jara datreveno de la unuaj eksplodoj de atombomboj en Hiroŝimo kaj Nagasako. La agado kontraŭ nukleaj armiloj tradicie estis kaj plu estas tre forta karakterizaĵo de la japana Esperanta-movado, aparte de la laborista.

Niaj italaj kamaradoj estis aparte aktivaj dum tiu ĉi kunmemoro ĉijara. Ne strange, ĉar en Italio la skandalo de la staplado de nukleaj armiloj fariĝis sufiĉe atentoveka. Interalie, ili sukcesis havigi al la partoprenantoj en kunveno kontraŭnuklea "6-9 de aŭgusto: Neniam plu Hiroŝima-Nagasaki", specialan mesaĝon de la Urbestro de Hiroŝimo, Akiba Tadatoŝi, kiu evidentigas la agadojn de la urboj Hiroŝimo kaj Nagasako por nuligo de nukleaj armiloj kune kun Urbestroj de pli ol 1000 urboj en la mondo aliĝintaj al la Monda Konferenco por Paco.

Por trasendado de la mesaĝo, apartan rolon ludis la internacia lingvo Esperanto: fakte la japanaj amikoj uzis kiel ponto-lingvo Esperanton, neŭtralan kaj egalecan idiomon kaj, do, aparte respondan kaj oportunan en tiu ĉi cirkonstanco.

**Al: "6-9 DE AŬGUSTO: NENIAM PLU HIROŜIMA! NENIAM PLU NAGASAKI!"**

2005.08.06 AKIBA Tadatoŝi, Urbestro de Hiroŝima, Japanio

> Okaze de la kunvenoj "6-9 de aŭgusto: Neniam plu Hiroŝima-Nagasaki" mi sendas mesaĝon al vi. Sur prapunkto de sperto atombombita antaŭ 60 jaroj, Hiroŝima daŭre apelaciadas nuligi nukleajn armilojn kaj realigi eternan mondpacon. Sed, ĉeno de malamo, perforto kaj venĝo en diversaj lokoj en la mondo restas ne interrompita, kaj ankoraŭ nun ekzistas multenombraj nukleaj armiloj sur la terglobo, eĉ kreskas ebleco de uzo de nukleaj armiloj.
>
> Pro tiu ĉi situacio, urbo Hiroŝima disvolvas Urĝan Agadon por Nuligo de Nukleaj Armiloj, por realigi ĝis jaro 2020, kune kun urboj, civitanoj kaj NGO en la mondo, ĉefe kun Monda Konferenco de Urbestroj por Paco, al kiu aliĝis pli ol 1000 urboj en la mondo. Aparte, urbo Hiroŝima strebas disvastigi Kurson de Hiroŝima-Nagasaki, kaj disvolvas projekton de leg-rakontado de plenaĝuloj al geknaboj pri travivaĵoj de atomombitoj, por ke aparte juna generacio komprenu signifon de mesaĝo de atombombitoj, ke "Ne donu al ĉiuj aliaj homoj sperton, kiun mi havis", kaj realan staton de atombombiĝo.
>
> En tiu ĉi situacio, en la jaro de la 60jara datreveno de atombombiĝo, tre signifa estas okazigo de ĉenaj kunvenoj "6-9 de aŭgusto: Neniam plu Hiroŝima-Nagasaki" en Italio, kaj mi esprimas profundan estimon al lukto de vi koncernaj gesinjoroj. Elkore mi petas al vi, ke ankaŭ de nun memoro de Hiroŝima restu en via koro, kaj kune kun ni strebu kaj agadu por realigo de la mondo sen nukleaj armiloj, por la mondo emancipita de malamo kaj teruro. Laste, mi preĝas sukceson de la ĉenaj kunvenoj, kaj sanon de vi ĉiuj partoprenantoj.

### BROŜUROJ PRI HIROŜIMO KAJ NAGASAKO

En nia Libroservo haveblas jenaj libroj pri la tragedio:

- *Vojaĝo al Hiroŝima*. Hiroŝima E-Centro. 1987. 60 paĝoj.
- *En la nubon ŝi sorbiĝis for!: la apelo el Nagasaki*. (La originalo kompilita de la Grupo de atombombitaj instruistoj, la redakta komitato de materialoj de porpaca edukado en Nagasaki.) Kanda-mati: Kjuŝua Esperanto-Ligo, 1973, 62 paĝoj.
- *Akvon, mi petas!* Hukuoka E-Societo. Hukuoka. 1984. 64 paĝoj.

Ankaŭ estas menciindaj tri libroj tradukitaj de k-do Tanaka Sadami, fidela SAT-membro ĝis sia morto en 1993, kiu dediĉis sian Esperantan vivon al tradukado de atombombtemaj verkoj en Esperanton.

- Ogura Toyofumi. *Kun la kadavro de l'edzino*. Osaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1954. Nur 52paĝa, ĝi estas ege kortuŝa rakonto de viro kiu travivas la unuajn momentojn de la eksplodo. Li estas je 4 kilometroj oriente de la eksplodcentro kaj poste piede vagadas tra la urbo serĉante siajn familianojn kaj malkovras la skandalajn teruraĵojn kaj rakontas...
- *Flustras Hiroŝimo* (ses porinfanaj rakontoj atombombtemaj), 1990, Osaka.
- *Infanoj de Hiroŝimo* (inkluzivas *Kanto de Hirosimo* de Ogura Toyofumi).



Delegacio de SAT rigardas sur mapo kia estas aktuala situacio sur la tereno minata



Laboro de surloka senminigo

# VIZITO AL KROATA CENTRO POR SENMINIGO

La Kongreso de SAT postulas en sia deklaracio ke la landoj, kiuj ne ankoraŭ subskribis la Konvencion de Otavo, pri la malpermeso de la uzado, produktado kaj stokado de kontraŭpersonaj minoj kaj pri la detruo de kontraŭpersonaj minoj, nepre subskribu kaj apliku ĝin.

La daŭra agado de niaj gekamaradoj Weiss permesis diversajn praktikajn agadojn en tiu ĉi gravega tereno tiom gravanta en multaj landoj de la mondo. Specife ili sukccesis la intereson de francaj oficialaj instancoj, kaj la helpo al tiuj laboroj en Kroatio.

La 7-an de julio, okaze de la SAT-Kongreso, komuna delegacio de SAT kaj KEL (Kroata Esperanto-Ligo) vizitis la sidejon de HCR (Kroata Centro por Senminigo) en urbo Sisak.

Post la informoj pri agado de HCR ili vizitis la terenon proksime de urbo Petrinja kie la skipoj de senminigado daŭre laboras. La enirejo de la labortereno estas tute proksime de la strato kaj domoj.

Tie daŭre atendas ambulanco. Ĉie trovigas atentigoj kun la vorto "minoj".

Kuraĝaj senminigistoj laboras ĉiutage dum kvin horoj, esplorante centimetron post centimetro, riskante sian vivon en ĉiu momento. Ili faras tion kontraŭ honte malalta salajro.

# MARŜO POR LA PACO EN ITALIO

En la itala urbo Peruĝo, startos la Marŝo de la Paco la venontan 11an de septembro.

La Marŝo startos je la 9 de la mateno en Peruĝo kaj atingos Asison post 22 kilometroj. Esperantistoj Italaj estos kun la flago: *Esperanto la lingvo de la paco*.

La enhavoj kaj celoj de la Marŝo aperas en la retpaĝo http://www.andreamontagner.it en la kategorio Paco (en esperanto).

# PACMOVADO EN BELGIO

http://www.vrede.be/esperanto.php

## INTERNA INFORMO

Ni ŝuldas apartan klarigon al la legantoj. De la momento de komenco de nia agado kiel asocio SAT-en-Hispanio, ni havis kiel klaran devizon ne partopreni en polemikoj kun aliaj asocioj. Fakte, ni ankoraŭ pensas ke nia agado pravigas nian ekziston, kaj ke ne sencas dediĉi nian tempon al disputo pri detaloj de la esperanta vivo, kiuj neniun interesas. Tiu intenco ne ĉiam estas plenumebla, des pli ke revuo sin nomanta laborista plenigas siajn paĝojn per atakoj al SAT kaj al ĝia gvidantaro.

Tial, SATeH sendis al SAT komunikon, informante pri la reala situacio de la laborista movado en Hispanio, kiu estis publikigita en unu el la lastaj numeroj de *Sennaciulo*. Krome, ni sendis apartan leteron, per kiu ni montris nian intencon ke nia asocio neniel estu obstaklo por trankvila agado de SAT. Ni plu daŭrigos nian laboron, sen atenti al malgrandaj kvereloj. Sciu do ke en tiu ĉi kazo silento ne estas konsento, kaj permesu ke ni ne plu atentu alies atakojn.

# NIAJ AGADOJ

En julio okazis ĝenerala Asembleo de SATeH. Aparta protokolo sendiĝas al la anoj de la asocio.

### KULTURA AGADO

Dum la lastaj monatoj ni faris penon por kompletigi la servon de perado de libroj en Esperanto, kiu nun inkludas, krom la eldonaĵojn de *Sennacieca Asocio Tutmonda*, ankaŭ materialon venantan el aliaj eldonejoj kaj servoj. Dum la lasta monato aldoniĝis eĉ alispeca materialo: kinaĵo en DVD, la hispana filmo "La pedalaŭto", kie Esperanto ludas gravan rolon, kaj kiun ni povas havigi al vi kontraŭ tre favora prezo, kompare kun la vendoj en komercoj.


Krome, la Libroservo taŭgas kiel montrilo de la esperanta kulturo al komencantoj kaj neesperantistoj, interalie per nia elmontrado en la nun tre zorgita adreso:

Libroservo: **http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm**

Diskoj: **http://personal.auna.com/mmmoral/indice.discos.1.htm**

SATeH montris lastatempe sian materialon en:

- Solidaraj Tagoj de Universitato Carlos III de Leganés
- Maratono de Rakontoj de Guadalaĥaro
- Hispana Esperanto-Kongreso de Alcalá de Henares




Aspekto de la Libroservo dum Hispana Esperanto-Kongreso

Niaj venontaj agadoj inkludas la denovan partoprenon en la Festo de Hispana Komunista Partio kaj en la Andaluzia Kongreso de Esperanto. Pri tio ni jam informos en venonta numero.

---

**Por kontakti kun ni:**


## SAT-en-Hispanio (SATeH)

Poŝtokesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

sateh@nodo50.org

http://www.nodo50.org/esperanto